Por ĉiutagaj informoj, eventoj kaj interesaj enhavoj, sekvu ankaŭ nian paĝon ĉe Facebook kaj Instagram.

# tejo:aktuale

n°487 | Septembro 2023

**Karaj abonantoj, bonvenon!** Jen via monata raporto pri projektoj, eventoj, kaj iniciatoj de junaj esperantistoj el ĉiuj kontinentoj. Kiel kutime, al nia movado ne mankas ŝancoj kontribui ĉi-monate, do ne maltrafu ilin! Kaj la venontaj semajnoj estos ankaŭ plenaj de oportunoj por esti kune denove kaj esperantumi (rete)! **Do... ni renkontiĝu tie?**




retoso
RETA EVENTO DE TEJO!

Nur kelkaj semajnoj restas ĝis Retoso 2023! Ĉi-foje, ĉiuj esperantistoj povos tute senpage ĝui la plej grandan retan eventon de TEJO, okazonta inter la 27-a kaj la 30-a de Oktobro. Aliĝu tuj, kaj ekkonu esperantistojn el la tuta mondo! Kiel kutime, buntaj programeroj

atendas vin, kaj vi mem povas kontribui per viaj propraj kontribuoj. Vizitu la retejon por ricevi pli da informoj.

---




**Dum Retoso ankaŭ okazos IRIS, la Internacia Reta Interfaka Simpozio.** Se vi estas studento aŭ esploristo, kaj volas prezenti vian laboron al fakemulaj esperantistoj, ni invitas vin sendi proponojn kaj kontribuojn. Ni esperas ricevi ilin **plej laste la 15-an de Oktobro 2023**.




Daŭrigu la longdaŭran tradicion de la plej granda kaj mojosa internacia evento de la mondo, kaj **organizu kune kun TEJO la 81-an Internacian Junularan Kongreson (IJK) en via lando en 2025**! Anoncu vian intereson ĝis la 5-a de Januaro 2024.




Ĉu vi estas adoleskanto kaj mankas al vi samaĝuloj por kune esperantumi? Ĉu vi ŝatus helpi kaj kontribui al la grupo por kreskigi kaj fortigi la movadon? Ni volas aŭdi de vi: plenigu ĉi tiun formularon, **iĝu parto de tutmonda grupo de adoleskaj esperantistoj kaj kontribuu al la komunumo!**




**La Movada Rubriko de *Kontakto* havas novan redaktoron: Ikvero Almejdo!** Ikvero respondecos pri tiu 4-paĝa rubriko ene de la revuo, kaj liveros aktualajn kaj interesajn informojn pri nia movado. Legu lian prezenton en niaj sociaj retoj!




En Junio 2023 delegitaro de TEJO-anoj partoprenis en la Eŭropa Junulara Okazaĵo (EJO), eventego organizita de la Eŭropa Parlamento. **Spektu nian unuan plurlingvan filmeton de EJO, kie ni parolis kun kelkaj partoprenantoj – ankaŭ pri Esperanto.** Subtitoloj haveblas en pluraj lingvoj!




Lastaj horoj por kandidatiĝi kaj ricevi financan subtenon de TEJO kaj BEJO por partopreni la **10-an Tut-Amerikan Kongreson de Esperanto**, kiu okazos en la urbo Fortaleza (Brazilo), de la 2-a ĝis la 5-a de Novembro! Ne maltrafu tiun oportunon!




La Komuna Seminario estas la plej granda kaj grava junulara Esperanto-evento en Azio. En 2023, la evento okazos en Vjetnamio de la 15-a ĝis la 18-a de Decembro. **Kandidatiĝu al la konkurso "Partoprenu KS-on" kaj ricevu monhelpon por partopreni ĝin! Kontaktu** vejo.vjetnamio@gmail.com ĝis la 31-a de Oktobro.




**Jen limdatoj por sendi artikolojn por la venontaj numeroj de la revuo *Kontakto*.** Notu ilin!

- 2023:3 → 30-a de Oktobro
- 2023:4 → 30-a de Novembro
- 2023:5/6 → 10-a de Januaro




La 21-an de Septembro, por celebri la Internacian Tagon de Paco, UEA skribis ke tiu tago estas "okazo por unuiĝi cele al plifortigo de kulturo de paco", do ni decidis disvastigi tiun kulturon de paco, kundividante en tiu eldono de TEJO Aktuale belan poemon pri paco. Havu belan legadon!

# Venontaj eventoj




**Retoso** estas la reta evento de TEJO organizita de junuloj kaj por junuloj, kiu okazos **inter la 27-a kaj la 30-a de Oktobro**. Ĝi donos al la homoj la eblon amuziĝi, lerni kaj renkontiĝi kun (novaj) amikoj en Esperantujo per la interreto.




**Fortalezo (Brazilo)** gastigos la 10-an eldonon de la **Tutamerika Kongreso de Esperanto de la 2-a ĝis la 5-a de Novembro.** La evento estas kunlaboro inter UEA kaj BEL, BEJO kaj CEA, kiuj dume okazigos ankaŭ siajn jarajn eventojn. Aliĝu nun!




GEJ elkore invitas al la **32-a Kreema Esperanto-Kurso (KEKSO),** kiu okazos **de la 10-a ĝis la 12-a de Novembro 2023 en Hamburgo (Germanio).** Tio estas evento por adoleskantoj kaj junaj plenkreskuloj, kiuj ŝatus kune lerni kaj paroli Esperanton.




IEJ invitas vin al la **Zamenhofa Aranĝo Toskana**, la evento organizita el la Piza Esperanto Grupo! La evento okazos en la urbo **Pisa (Italio) de la 17-a ĝis la 19-a de Novembro** per plenplena taga kaj nokta programo!





**La 4-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK) de UEA okazos de la 23-a ĝis la 26-a de Novembro 2023!** Ĝi estas senpaga por individuaj membroj de UEA, kiuj aliĝos al ĝi ĝis la 13-a de Novembro 2023.




**JES, la Junulara E-Semajno okazos en Storkow (Germanio) de la 27-a de Decembro ĝis la 3-a de Januaro.** Kiel kutime, la teamo antaŭvidas riĉan kaj buntan programon (koncertoj, ekskursoj, Esperanto-kursoj kaj multe pli)! Eksciu pli pri kio okazos dum JES kaj aliĝu!

Trovu pli da eventoj sur la retejo eventaservo.org.

**Por pli da TEJO eventoj, alklaku la bildon!**






**Iĝu parto de nia tutmonda komunumo!**
**MEMBRIĜU EN TEJO!**

Kiel membro de TEJO, vi subtenos nian junularan movadon, ricevos la revuon *Kontakto* kaj rabaton al IJK kaj aliaj eventoj. Vi havos la eblon partopreni en trejnadoj kaj projektoj, kaj kundecidos pri nia agado. Vi povos ankaŭ aktive kontribui al TEJO partoprenante en la Komitato aŭ niaj komisionoj.

---

**Ĉu vi volas kontribui sendante interasajn novaĵojn por la venonta numero de TEJO Aktuale?**

Sendu viajn novaĵojn al **info@tejo.org** antaŭ la 23-a tago de la monato

Antaŭdankon pro la helpo!

## Kolofono

***TEJO Aktuale*** estas retpoŝta informilo de TEJO. Ĝi estas senpage abonebla, aperas 1 foje monate kaj koncize kompilas freŝajn, konkretajn informojn pri la junulara E-movado kaj ligilojn al interesaj retpaĝoj – pli rapide ol povus tion fari paperaj revuoj.

**Redaktoro:** Jeanne Grimaud
**Eldonas:** Tutmonda Esperantista Junulara Organizo (TEJO) · tejo.org

*Kopirajto © 2023 TEJO*

*Ĉi tiu laboro disponeblas laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite-Samkondiĉe 4.0 Tutmonda*

Ĉu vi volas ŝanĝi kiel ricevi ĉi tiujn retpoŝtajn mesaĝojn?
Vi povas ĝisdatigi viajn agordojn aŭ malaboni vin de ĉi retpoŝta bulteno.

This email was sent to <<Retpoŝtadreso>>
*why did I get this?* unsubscribe from this list update subscription preferences
Tutmonda Esperantista Junulara Organizo · Nieuwe Binnenweg 176 · Rotterdam, Zh 3015BJ · Netherlands